



1908 –  
2018

Nro. 1—2.	Februaro-Marto 1908.	Unna jaro.
Jarabono: 50 spesdekaj (sd)	1) Esdonanto: F. Häber, Mülheim a. Rhain (Germanujo) Unn numero: 6 sd. Friedr. Wüh, Strasse 66.	Oni abonu per postmandato
1 spesmito (sm) = 100 sd = 2 markoj = 2 ŝilingoj = 2,50 frankaj.		

### Al la karaj amikoj kaj samideanoj!

Kun multe da gojo kaj danko al nia Dio ni sciigas al vi, ke nun Esperanto iom post iom eniras en niajn unuigojn. Nia disvastiga laboro komencita per helpo de Dio, ĉiam plimultigas kaj jam ne estas eble, informi ĉiujn amikojn per poŝtkartoj aŭ leteroj pri la progreso de Esperanto.

Tial ni decidis, eldoni tiun ĉi unuigon en esperante, ke niaj samideanoj, kiuj ne povas legi, plej multajn legantojn.

Ni petas nun niajn karaj amikojn, ke ili plej ofte sendi al ni sciigojn pri la stato de Esperanto en iliaj unuigoj, kiujn ili raportojn.

Plue ni petas, afable sciigi niajn karaj amikojn, ke ili antistoj en la „Kristanaj Unuigoj“ ĉar ni intencas, eldoni baldaŭ tiun ĉi unuigon en nia mondigo.



1968  
– 2018



200 reprezentantoj, membroj de IKUE kaj KĈI, venis al 18 landoj el sia unua katolika kongreso en Linzberg-Lahn. Ĝi la unika katolika kongreso havis tiel multe da homoj kaj rezultojn, kiuj elprenis legon al la numero. Ĝi laŭbezonas kaj la sekularoj — multaj el la katolikaj venis — ĉiujn scias produkti tiu kongreso. Nia ĉiujn montras parton de la kongresanoj dum la sekulara kongreso.

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':  
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis:** Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

50 jaroj de ekumenismo, kaj poste	27
La testamento de Luther – 2a parto	29
Angelus Silesius, silezia mistikisto	33
Longa vivo	40
Pri miaj Esperanto-tekstoj	41
Invito al Esperanto-muzeo en Svítavy	43
Informetoj	46
Pavel Polnický - honora membro	47
Venu, benu, gloru	48

## Redaktoraj vortoj

La jaro 1968 restas en nia memoro pro multaj kaŭzoj. Inter alie mortis Martin Luther King, Robert Kennedy kaj Karl Barth. En 1968 ankaŭ okazis plurloke gestudentaj protestoj. En Prago la orientiĝo al pli malferma socio renkontis la armilojn de la Varsovia Traktato. Sed bonŝance ne nur malagrablaĵoj okazis. En tiu jaro, por la unua fojo, okazis samtempaj kongresoj de IKUE kaj KELI en Limburg/Germanio, do la unua Ekumena Esperantista Kongreso. La ekumena laboro inter esperantistoj dum la jaroj plifortiĝis sed restas ankoraŭ pluraj paŝoj. Ĉi-jare, en Poděbrady, ni povas kontribui al tiu ekumena agado. El la ekumena laboro ekster niaj esperantistaj rondoj ni certe povas multon lerni kaj el tia laboro Philippe Cousson raportas ĉi-numere. Alia raporto, kiun mi volas akcenti ĉi-numere, estas tiu de Gerrit Berveling pri la grava traduklaboro kiun li faris kaj faras. Nepre legu sur la antaŭlasta paĝo pri la honoro donita al nia multflanka sekretario. Bonan legadon!

# 50 jaroj de ekumenismo, kaj poste

Philippe Cousson, FR

**A**ntaŭ 50 jaroj ne nur okazis la unua ekumena esperantista kongreso, sed ankaŭ komencis sian vivon la Supera Instituto pri Ekumenaj Studoj (ISEO) en Parizo.

Ĝi funkcias ene de la teologia fakultato de la Katolika Instituto. En ĝi kunlaboras la Protestanta Teologia Instituto kaj la ortodoksa teologia Instituto Sankta Serĝo. Inter la diplomoj kiujn ĝi preparigas estas la Supera Diplomo pri Ekumenaj Studoj, kun instruistoj el la tri fakultatoj.

Ĉiujare dum printempo ĝi organizas kolokvon tritagan kun prelegoj de diversaj fakuloj.

En 2018, la temo estis: “Novaj teritorioj de ekumenismo: movoj dum 50 jaroj kaj alvokoj por la estonteco”.

En la unua tago, la franca Granda Rabeno Korsia lasis al ni ĉi tiun moton: pli ĝuste diru “Iru al paco” ol “Iru en paco”. La renkonto estas ĉiam movo,

kaj ĉiu devas eliri el sia propra Egiptio.

En la mateno la franca pastorino Jane Stranz komparis la historion de ekumenismo al la vojo de rivero, kiu nun estas en stadio de delto, kun multaj fluejoj kaj insuloj, eblecoj kaj problemoj. Mi ne ĉiujn prelegintojn prezentos. Mi pensas ke tiuj ideoj devas pensigi nin.

Ni aŭdis pri kio povas esti “diferencigita konsento”, kaj kiamaniere ni povas vivi la komunecon (koinonia) ene de la sama konfesia familio kaj inter la kristanoj ĝenerale.

Ni ĉiuj komune referencas al la Biblio, sed ĉu tiu referenco estas helpa aŭ bremsa? Ekzemple, ni ne havas la saman kanonon, la saman liston de bibliaj libroj. Aŭ ni ne konsentas pri la maniero ekzegezi, kvankam pli kaj pli la fakuloj alproksimiĝas.

Praktike, la etikaj vidpunktoj varias, eĉ la limoj troviĝas ene de la konfesioj. Daŭre dialogi necesas.

Eĉ, kio devus kunigi nin kristanojn fakte dividas daŭre nin, nome la sakramentoj, kaj lige kun ili la kompreno pri la naturo de la Eklezio. Tiurilate la akcepto aŭ neakcepto de virina ordinita servado same daŭre dividas la ekleziojn.

Du prelegantoj koncizigis nin pri la fakto ke antaŭ la mondo, ni, kristanoj, estas vidataj kiel samaj. La UN-direktoro pri aidoso apelaciis al la helpo



kaj subteno de “la Eklezio”, ne de tiu aŭ alia eklezio, sed de “la Eklezio” kvazaŭ por la mondo bezonanta ni estas jam unu kiun la aliaj bezonas. Ortodoksa pastro komprenigis al ni, ke kiam teroristo ekstremista islamista murdas kristanojn (Ili ankaŭ murdas islamanojn kaj aliajn) ili ne celas tiun aŭ alian konfesion, sed kristanismon tiakaze. Antaŭ la cetera mondo, la kristanoj troviĝas nun “en la sama sako”. Por la plejmulto niaj diskutoj kaj disputoj havas nenian signifon. Ni estas atakataj kiel kristanoj. Ni estas atendataj kiel kristanoj.

Fakte, en nia nuntempo, aparteneco estas pli komplika, kompleksa. Ne sufiĉas diri: mi estas tia. Oni tuj aldonas: kaj ankaŭ tia sed ne tia. Ene de la propra konfeso troviĝas distingoj, tra la konfesioj estas samecoj. Bonhoeffer en sia libro pri komuneco aludas al muziko, kiam ĉirkaŭ komuna peco, “*cantus firmus*” troviĝas variaĵoj. Kio estas nia

“*cantus firmus*”? Cetere, ĉu ĉiam oni devas veni al konsento, aŭ ĉu foje pli valoras bona malakordo?

La franca antila poeto Edouard Glissant, citita de preleginto, parolis pri arkipelaga penso. Ni oftege pensas per kontinenta penso, eĉ tektonike, kiam ni devus pensi ĝuste arkipelage, pluraj malsamaj insuloj en rilato unu kun la aliaj kaj konsistigantaj arkipelagan tuton.

Ekumenismo estis, estas kaj estos plurnivela: de la bazaj kristanoj, de la teologoj, de la ekleziaj instancoj, kaj sub la okuloj de la cetera mondo.

Por reveni al niaj ekumenaj kongresoj, konklude, mi rememoras prelegon de Lajos Kóbor en Dalfsen: *Kion ni povas fari kune sen diskuti (disputi) pri teologio?*

Ĝis baldaŭ en Poděbrady.



## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

16. aprilo

Eterna Dio, aŭdigu hodiaŭ al mi Vian voĉon. Donu ke la kriadu de la mondo ne silentigu tiun ĉielan voĉon, kaj ke mi tamen kuru por helpi la kriantojn. Mi ne nur aŭdu ĝin en la silenta hejma ĉambro, sed ankaŭ meze inter la bruo de la trafiko kaj la svarmado de la homoj.



Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 74). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.

# La testamento de Luther – 2a parto

Prelego dum la kongreso en Zöblitz 2017

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

**P**asintnumere ni eksciis kiam kaj kial Luther skribis sian testamenton. Nun ni rigardu, kio okazis poste al la papero mem!

Dum unu kaj duona jarcento malaperas la originalo de la testamento de Luther.

Pri la origina dokumento oni longe nenion sciis, verŝajne la sekvantoj, la familianoj gardis ĝin. Plej longe ni povas sekvi la spuron de la familio de Paul kaj la sekvantoj de lia filo: la lasta pranepo kiu uzas la Luther-nomon estas Martin Gottlob Luther, kaj li mortis en 1759 en Dresdno.

La unua dateno estas en la libro de la historiisto Juncker en 1706.

Li estis la unua, kiu esploris tiun demandon, kaj trovis la originalon de la testamento. Samuel Benedict Carpzow, la kortega ĉef-pastoro kaj eklezia ĉef-konsilisto de la saksa princo, informis lin, ke la aŭtografia skribaĵo estas lia posedaĵo.

La Carpzow-familio ekde la komenca forte respektis Luther. Pluraj inter ili estis teologiaj instruistoj, reprezentantoj de la luthera ortodoksio, aliaj havis politikan-socian rolon, havis altajn pastrajn postenojn. Do estas ege ŝajna, ke aŭ mem Samuel Benedict Carpzow, aŭ iu antaŭulo akiris la testamenton de la Luther-familio, sed certe jam antaŭ 1706.

Poste denove pasis cent jaroj, kiam

ni nenion scias pri la testamento.

En 1803 mortis la lasta vira membro de la Carpzow-familio, Johann Benedict Carpzow, teologia doktoro, profesoro de la greka lingvo en Helmstedt. Li lasis grandiozan manuskriptan kaj libran heredaĵon post si mem. Tiun detale montras la listo, kiun oni eldonis pro la aŭkcio, kie oni vendis ĉion.

Tiun altvaloran dokumenton – kun aliaj manuskriptoj kaj libroj – aĉetis hungara kolektanto!

Sur la testamento, kiu estis en ruĝa velura kovrilo, eblas legi: El la kolektaĵo de la venditaj libroj de J.B. Carpzow aĉetis Miklós Jankovich por 40 guldenoj en 1804.

## Kiu estis Miklós Jankovich?

Li naskiĝis en riĉa familio en 1772 en Pest, lernis historion kaj juron, kaj fariĝis entuziasma kolektanto. Li estis katolika, sed li respektis ĉiujn aliajn religiojn kaj ekleziojn kaj per bona “nazo” eksentis la valoraĵojn. Tiutempe, en 1802, fundis la grafo Ferenc Széchenyi la nacian bibliotekon kaj Jankovich aĉetis plurajn aĵojn por donaci al la biblioteko.

La testamento de Luther elbrilis el lia kolektaĵo, kaj pluraj gravuloj kun granda ĝojo salutis lin pro la aĉeto. Jankovich en sia testamento, kiun li skribis en 1815 donacis 80 valorajn dokumentojn – inter ili la testamenton



Miklós Jankovich [Vikipedio]

– al la arkivo de la lutherana eklezio.

Tiutempe la evangelia eklezio ankoraŭ ne havis arkivon, do ili decidis, ke la dokumentoj restos ĉe le donacinto. Jankovich ofte eldonis multe pli da mono ol li havis, do en 1831 li faris kontrakton kun la Nacia Muzeo kaj vendis al ili parton de sia kolektaĵo. Inter la dokumentoj estis ankaŭ la testamento de Luther, sed la 3a punkto de la kontrakto diris, ke tion li antaŭe donacis al la lutherana eklezio, do la testamento ne estas inter la posedaĵo de la Nacia Muzeo.

La testamento unue restis en la Jankovich-domo, poste en loĝejo de iu oficisto de la malnova muzeo, de kie oni sukcesis savi ĝin dum la granda inundo en 1838.

En la diversaj protokoloj de la lutherana eklezio denove kaj denove ni trovas mencion pri la testamento, ke ili petu la dokumenton de la Nacia Muzeo. Okazis multaj korespondadoj kaj fine

en 1845 alvenis la testamento al la laŭleĝa posedanto, al la arkivo de la lutherana eklezio.

Estis ankaŭ kritikistoj, laŭ kiuj devus resti la dokumento en la Nacia Muzeo, kie pli granda publiko povas ĝin rigardi. Pri tio la kunveno de la eklezio ne povis decidi, sed ili decidis fari kopiojn (faksimile), kiun oni sendis inter alie ankaŭ al la naskiĝ-urbo de Luther, al Eisleben.

Pri la garda loko de la testamento ili decidis, ke en la ruĝa velura kovrilo en fera skatolo ĝi restu fermita en la trezor-ŝranko de la arkivo de la eklezio.

Dum longaj jardekoj ĝi restis tie, ĝis en 1878 en la tutlanda kunveno de la lutherana eklezio venis la demando: ĉu oni ne devus ekzameni la originalecon de la diversaj dokumentoj, kiuj estas en la arkivo, kaj eble la plej valorajn aĵojn ie aparte gardi? La kunveno elektis fakan komitaton por tiu celo kaj laboro – ses elstarajn scienculojn:

altajn postenulojn:

- barono Albert Nyáry, heraldikisto, historiisto
- Ferenc Pulszky, arkeologo, art-historiisto, iama diplomato de Kossuth, la direktoro de la Nacia Muzeo
- Mihály Zsilinszky, historiisto, poste ŝtata sekretario

reprezentantojn de la pastoroj:

- Sándor Doleschall peŝta germana pastoro
- Vilmos Györi, poeto kaj tradukisto, peŝta hungara pastoro
- Lajos Lajos akademiano, historiisto, eklezia distrikt-estro de provinca urbo, Békéscsaba

Unue ili ekzamenis la paperon kaj konstatis, ke estas duobla akvomarka/akvosigna papero. Unu el ili estas la saksa heroldo kaj la ĉapelo de la princo, la dua estas granda F-litero kaj unu aglo, kaj la materialo de la papero sendube estas farita en la “ĝusta” tempo.

La testamento estas kvin kaj duono paĝoj, kune kun la subskriboj entute 126 linioj.

Al la ekzamenado Pulszky, la direktoro de la Nacia Muzeo, kunportis ilian havaĵon: originalan leteron de Luther el la jaro 1535. Kaj Haan kunportis faksimilan manuskripton de Luther el la jaro 1542, do el la sama jaro de la testamento.

La fakula komitato deklaris la senduban kreditecon, ke la testamento estas la originala dokumento kaj proponis al la sekvonta jarkunsido, ke en la estonteco la plej valorajn dokumentojn – inter alie kompreneble la testamenton – oni sub vitro prezentu al la publiko, ke oni – plej parte la gejunuloj – sciu kion la mondo ricevis de la reformacio.

La raporto de la komitato aperis en la gazeto de la eklezio. De tie transprenis kelkaj aliaj gazetoj la raporton. La plej multaj homoj ĝis tiam nenion sciis pri la afero.

Temis pri sufiĉe faka agado, do estis surprizo, kio poste okazis.

Ĉar mistera okazaĵo venis – granda, eĉ grandega bruo!

La fonto de la bruo estis unu artikolo, kiu aperis en la gazeto *Wiener Fremdenblatt*, kaj skribis ĝin Karl Reuss, kiu diris pri si mem, ke li estas fak-historiisto.

## Kio estis en la artikolo?

Ni vidu:

1. la membroj de la komitato ne estis fakuloj, nur famaj parlamentaj oratoroj,
2. la komitato eraris, ĉar la originala testamento estas en Heidelberg, en la biblioteko eblas vidi ĝin, estas tie sub vitro,
3. la verkisto de la artikolo aludis al internacia scienca aŭtoritato, Leopold von Ranke historiisto, kiu tion diris, kaj tiu ĉi fakto estas trovebla en la libro de von Ranke
4. en Hungario estas nur unu kopio, kiun la vidvino de Luther donis al János Honterus, transsilvania reformatoro, kiam li en 1549 vizitis la tombon de Luther, kaj kunportis donacon al ŝi de la transilvaniaj saksoj – do verŝajne tiu kopio poste estiĝis la havaĵo de la hungara eklezio.

Tiel memfida kaj forta estis la tono de la artikolo, ke ne ebligis kontraŭdiron kaj ĝi multajn homojn konvinkis.

Aperis multaj artikoloj, estis pli kaj pli granda la skandalo, ĝis la unu nura homo, pastoro Doleschall fine komencis esplori la situacion.

Unue li skribis al la viena gazeto: kiu estas tiu historiisto, Karl Reuss, sed ili nenion povis respondi. Doleschall skribis ankaŭ al aliaj gazetoj kaj institutoj, sed neniu konis tiun ĉi nomon – do oni rapide malkovris, ke iu sub pseŭdonimo skribis la artikolon.

Poste Doleschall skribis leteron al Leopold von Ranke kaj petis pli detalan informon de li. Ranke tiel respondis: Mi devas konfesi, ke mi tute ne memoras,

ke iam ajn mi diris ion ajn pri la testamento de Luther. Unu el miaj amikoj kontrolis ĉiujn lokojn, kie mi estus povinta skribi pri ĝi, sed trovis nenion. Vere, la konkreta libro pri kio “Karl Reuss” skribis, eĉ unu vorton ne enhavis pri la testamento.

Doleschall ankaŭ esploris la vojaĝon de Honterus al Wittenberg. Neniu skriba spuro restis pri tio, sed alie en la menciita jaro, Honterus la 23an de januaro 1549 mortis en Transilvanio. Laŭ la respondo de la transilvania eklezio, ili neniam aŭdis pri la kopio de la testamento, en ilia tradicio tute ne estas menciita tio.

Doleschall demandis ankaŭ la heidelbergan bibliotekon. La direktoro, profesoro Zangemeister respondis: Al via demando mi havas bonŝancon sciigi vin, ke la originalo de la testamento de Luther ne estas kaj neniam estis en la heidelberg biblioteko, do la vizitantoj ne povas kaj neniam povis vidi ĝin en niaj vitraj ŝrankoj.

Neniam malkovriĝis kiu kaj kial skribis la artikolon...

Denove venis paco kaj silento ĉirkaŭ la testamento, ĝis 1936.

La ĉefrolanto de tiu ĉi ĉapitro estis Hermann von Trenkwald, nobla aŭstria kortega konsilisto. Lia patro estis ĉeĥa-germana viro, li naskiĝis en Prago kaj de Francisko Jozefo ricevis aŭstrian nobelecon, estis profesoro de viena arta akademio. La (duon)patrino, kiu ekde lia infanaĝo zorgis pri li, estis grafino Thun, la nevino de la fama kultura ministro Leo von Thun.

Malmulte ni scias pri von Trenkwald.

En la viena filozofia fakultato li faris sian doktoriĝon, kaj dum multaj jaretoj estis la direktoro de iu viena muzeo. Heredis la riĉan artan kolektaĵon de la patro kaj faris konsilistan oficejon pri artaĵoj en la centro de Vieno.

Do li estas tiu, kiu komencis iun strangan agadon en la jaro 1936.

Li skribis leteron al la tiama direktoro de Lutherhalle, al la profesoro Oskar Thulin. En la letero li skribis, ke la testamento de Luther estas en Budapeŝto kaj li havas la informon, ke eblus aĉeti ĝin, do estus ebleco ke Lutherhalle ekhavu tiun gravan dokumenton. Li substrekis, ke la afero bezonas fortan diskretecon, ĉar la traktado ankoraŭ estas nur je la komenco – kaj li skribis, ke li bezonas komision de Lutherhalle aranĝi tion, kaj li havas bonan kontakton kun la germana ambasadoro en Budapeŝto, kaj oni devus eluzi la nuntempan politikan situacion.

Profesoro Thulin ne tenis la petatan diskretecon, kaj tuj skribis al sia bona kaj longtempa amiko, al la ĉefsekretario de la hungara lutherana eklezio, Dezső Kuthy. Li skribis, ke estus bela, se la hungara eklezio aŭ kiel donaco aŭ kiel pruntedono donus la testamenton al Wittenberg, ke la tuta mondo povu vidi ĝin.

Trenkwald daŭrigis sian agadon. En februaro de 1937, eĉ “hazarde” renkontiĝis kun alia ĉefo de la hungara lutherana eklezio, Albert Radvánszky, kiu al lia demando ne respondis ne. Verŝajne Radvánszky simple volis esti ĝentila kaj diplomata, sed tiun respondon Trenkwald volis aŭdi, kiel “jes”.

Ĉiuj detaloj jam ne estas interesaj,



sed Trenkwald sendis multegajn leterojn en la sekvontaj jaroj, kaj provis kolekti monon (li ie skribis, ke lia “salajro” kutime estas 10-15 procentoj, kaj parolis pri pli kaj pli alta sumo) kaj klopodis organizi renkontiĝojn kun pli kaj pli altaj naziaj oficistoj. Ekde 1938 ĉiujn leterojn li finis per la saluto: Heil Hitler...

Dum kvin jaroj li sekrete kaj diskrete, kaj terure perforte kaj multe agis, kaj parolis kun multegaj homoj – sed kun la hungaroj ne.

Do, post tiu ĉi longega kaj komplika agado fine en la jaro 1941 alvenis la oficiala peto al la hungara eklezio, por ke post kelkaj semajnoj ĝi alvenu ankaŭ diplomatie. Tamen forte nea respondo.

Pluraj en la estraro tiel opinias, ke la donaca kontrakto kun Jankovich ne ebligas la aferon, ĉar estas en tiu kontrakto unu punkto, laŭ kiu la ricevinto ne rajtas vendi la donacon.

—  
**S**ed ne pensu, ke ni hungaroj estas **S**enviemaj!

Jam ankaŭ antaŭe, kaj ankaŭ nun, en tiu ĉi festa jaro, 500 jarojn post la reformacio, ni pruntedonis la testamenton al Germanio, ke ĉiuj, kiuj interesiĝas, povu vidi ĝin.



## Angelus Silesius, silezia mistikisto

Lia Vivo

Prelego dum la ekumena kongreso en Vroclavo

Gottfried NOSKE, DE

**A**ngelus Silesius civile nomiĝis Johannes Scheffler. Li naskiĝis en Breslaŭ/Silezio, kiu nomiĝas nun Wrocław. Tie la malgranda Johano estis baptita la 25an de decembro 1624.

Lia patro, Stanislaus Scheffler, unue posedis bienon apud Krakovo. Li estis nobeligita de la pola reĝo Sigismundo (pole Zygmund) la Tria Wasa pro siaj meritoj. Sed pro sia evangelia kredo li elmigris el Pollando. En Breslaŭ li edziĝis al la nepino de la Breslaŭa reformanto Johannes Heß. El tiu edzeco

devenis krom la unue-naskiĝinto pliaj du infanoj, Magdalene kaj Christian.

Kiam Johano havis 13 jarojn, lia patro mortis, kaj post du jaroj ankaŭ la patrino. Sed pro la sufiĉe granda heredaĵo de la patro minimume ne estis timenda financa mizero. Tial li povis frekventi ankaŭ la renomman Elizabetgimnazion en sia naskiĝurbo. Tie estis lia instruisto Christoph Köler, la amiko kaj biografo de la poeto Martin Opitz, kiu favoris liajn poemajn provaĵojn.

19 jarojn aĝa Johano iris al Stras-

burgo kaj poste al Leyden/ Nederlando, por studi medicinon en la tieaj universitatoj. En Leyden li amikiĝis kun la silezia mistikulo Abraham von Franckenberg. Tiu antaŭulo de la pietismo kaj amiko de Jakob Böhme, kiu estas nomata “philosophus teutonicus”, malfermis al li ties verkaron kaj same konatigis lin kun la spirita mondo de Paracelsus, majstro Eckehart kaj Taŭler.

En 1646 Scheffler forlasis Leyden kaj iris al Padovo/Italio, kie li finis siajn studojn kaj doktoriĝis en medicino kaj filozofio.

Poste li revenis en sian silezian hejmlandon, kie li iĝis persona kuracisto de la duko Sylvius Nimrod de Württemberg en Öls. Tiu malgranda urbo, pole Olesnica, situas 30 km nordoriente de Breslaŭ. Ĉi tie profundiĝis ankaŭ la amikeco kun Franckenberg, kiu loĝis nur 5 km sude de Öls sur la bieno Ludwigsdorf. Ties morto faligis lin en nedireblan tristecon. Samtempe li opiniis la kapricojn de la tirana duko pli kaj pli neelteneblaj. Krome la konflikto kun la ortodoksa luterana kortega pastaro iĝis nepacigebla. Ĉar ili kritikis lin pro lia individualisma mondkoncepto kaj riproĉis lin pro kvazaŭ mistika panteismo. Ĉi tio instigis lin forlasi Öls kaj translokiĝis al Breslaŭ. Tie li faris je la 12a de junio 1653 gravan decidon treege malaprobitan de siaj ĝistiamaj amikoj kaj malamikoj: Li konvertiĝis al katolikismo kaj konfirmaciigite li akceptis memore al la hispana mistikulo Johano de Angelis la nomon “Angelus”. Tiun li poste uzis kun la aldonajo “Silesius” kiel pseŭdonimon por siaj poemoj. Laŭ mi lia nomo

signifas “silezia anĝelo”, sed oni tradukas ĝin ankaŭ “silezia kuriero”.

En 1654 li iĝis imperiestra kuracisto kaj membro de la rozaria kongregacio.

Sian novan kredon kaj pensmanieron li montris sur la publika forumo, kiam li partoprenis en pilgrimado al la tombo de Sankta Hedwigo en Trebnitz (pole Trzebnica). En tiu pilgrimado li antaŭiris havante brulantan torĉon en sia maldekstra mano, krucifikson en sia dekstra kaj dornokronon sur sia kapo.

Februare en la jaro 1661 li iĝis membro de la franciskanoj kaj je la 21a de majo en la sama jaro li sacerdotiĝis en Neiße (nun: Nysa). En la sekvanta jaro li ekscitis ĝeneralan indignon en Breslaŭ, kiam li organizis la unuan fojon post la reformacio procesion okaze de la festo de Korpo kaj Sango de Kristo kaj en tiu li portis la monstrancon. Tiu okazintaĵo alportis al li multe da moko kaj riproĉo fare de la protestantoj, kontraŭ kio li sin defendis per polemikaĵoj (cetere sub la nomo J. Scheffler).

De 1664 ĝis 1671 li okupis la oficon de kortega marŝalo de la Breslaŭa princepiskopo Sebastian von Rostock, post kies morto li retiriĝis en la monaĥejo de la kruc-kavaliroj dediĉita al Sankta Matiaso (nun: biblioteka Ossolinskich). Tie li vivis en kvieto kaj izoliteco, precipe ĉar maligna malsano lin tre turmentis.

Je la fino de sia vivo li donacis sian havaĵon al la malriĉuloj, ĉar li volis porti en si nur “Jesuon kiel plej valoran trezoron”. Kun la devizo “Jesus mia omnia” (Jesuo ĉio mia) sur siaj lipoj li forpasis en Dia paco je la 9a de julio 1677 kaj trovis sian lastan ripozejon en

la monaĥeja preĝejo de Sankta Matiaso. Lia tombo ne plu estas trovebla, sed tomba tabulo memorigis ĝis 1945 al “la granda kristana poeto de Germanio” kaj “admonanto al devota pieco”; en la jaro 2000 ĝi estas anstataŭigita per memoriga tabulo kun germana kaj pola tekstoj.

### Lia literatura verkaro

Por kompreni la vivon kaj verkaron de Johano Scheffler, ni devas direkti nian rigardon al la tiama malkvieta kaj ekscitiga tempo. Ekzemple liaj unuaj jaroj estis stampitaj per la tridekjara milito, kiu postlasis siajn kruelajn spurojn ankaŭ en Silezio.

En Silezio la reformacio estis disvastiĝinta rapide, sed la katolikismo povis regajni terenon sub la regado de la Habsburgoj kaj dum la tiel nomata kontraŭreformacio per la Jezuitoj. En tia situacio la konvertiĝo de konata persono devis eksciti animojn de ties kontraŭuloj, kio manifestiĝis kontraŭ li en plej malbonaj insultadoj, kalumniadoj, mokaj kaj sarkasmaj paroloj kaj pamfletoj. La reago de Scheffler estis 55 defendaj paroladoj kaj konfesi-polemikaj traktadoj. Al ili tute ne mankis akreco nek personaj atakoj, sed Scheffler pruvis en ili ankaŭ siajn teologiajn sciojn, sian grandan elokventecon kaj sian lingvan lertecon.

Tio ne mirige! Dum la 17a jarcento Breslaŭ kaj Silezio okupis ja elstaran rangon en la germana literaturo, ekde kiam Martin Opitz estis metinta la fundamenton por ties plia evoluo pere de sia “Buch von der deutschen Poeterey” (“libro de la germana poezio” 1624). La “Silezia Jarcento” estis

stampita antaŭ ĉio per famuloj kiel Jakob Böhme, Andreas Gryphius, Christian Günther, Christian Hofmann von Hofmannswaldau, Caspar von Lohenstein, Friedrich von Logau kaj aliaj. Al ĉi tiuj apartenas ankaŭ Angelus Silesius. Ties verko “Heilige Seelenlust” (Sankta plezuro de l’animo) restis tute en la tradicio de la baroka paŝtista poezio. Ĉi tiu kolekto da poemoj, kies kvar libroj aperis je 1657 kaj en reeldono de la jaro 1668 per kvina libro estas pliigita, ne proklamas fuĝon el la kruda realeco nek la laŭdon de la simpla paŝtista vivo, ankaŭ ne la surteran amon kaj suferojn de la amo nek sopiron nek amikecon, sed kvazaŭ en ĉi tiu kostumo li aperigas, kiel la dua titolo tekstas, “spiritajn paŝtistajn kantojn de la psiko enamikiĝanta al sia Jesuo”. Ili anstataŭigas entuziasmon pri naturo per religia ardego. Multaj el ili verŝajne ĝojigas ankoraŭ nun la koron de sciencisto pri la baroka poezio, aŭ malicaj mokantoj supozeble klopodas penetri en “la spiritan paradizeton, kie la psiko suspiras pri sia Jesuo kiel soleca turteto pri sia kunulo”. Sed kelkaj kantoj ricevus ĝis nuntempe eniron en ekleziajn kantlibrojn, kaj ili estas kantataj sammaniere kaj de katolikoj kaj protestantoj. Kiel ekzemplojn mi citas nur: “Mi volas ami vin, mia forto”, aŭ “Post mi! parolas Krist’ Jesu” (komparu “Adoru” n-ro 269) kaj fine “Nigran nokton luna stel” (kp. “Adoru” n-ro 399).

Krome la influo de Angelus Silesius sur la evangelia pietismo kaj precipe sur Gerhard Tersteegen (1697 – 1769) ne estas subtaksenda (Komparu en “Adoru” la kantojn n-ro 439: “La forton mi de

l'amo benas" aŭ 368 "Ni gloras Vin, ho riĉa font'" aŭ 663 "Jen tag' al tago diras" aŭ 846: "Dio ĉe ni estas " aŭ fine la Kristnaskan kanton "ĝojkriu, ho ĉieloj", "Gotteslob", 144).

La plej valora verko de Angelus Silesius tamen estas sendube liaj "Geistreiche Sinn- und Schlußreime" (Spiritplenaj sentencoj kaj rimoj), kiujn li eldonis la unuan fojon en la jaro 1657 kaj kiuj estas konataj kiel "Cherubini-scher Wandersmann" (Keruba Migranto) ekde la dua pliigita eldono de la jaro 1675. La inspiradon al tio li ŝuldis al sia amiko Abraham de Franckenberg, sed same povas esti konstata grava spirita influo de majstro Eckehart; ĉar multaj epigramoj montras okulfrapan akordon kun ties idearo. Ja, ni devas eĉ diri: En la "Keruba Migranto" densiĝis la tuta idearo de la mistiko la unuan fojon en la germana lingvo, kiel same la baroka mistiko atingis kulminon. Ĉar ekzemple Jakob Böhme ankoraŭ estis provinta mallarĝigi la malakordon inter Dio kaj mondo, kio en la praktika vivmaniero kaŭzis disharmonion inter asketismo kaj plezurego de la sensoj. Angelus Silesius nun superis ĉi tiun malakordon per mistika profundigo, per sento de bona prizorgado kaj de la kuniĝo de ĉiuj antagonismoj, kiun kaŭzas Dio harmoniiganta ĉiujn disonancojn.

Angelus Silesius rezignis pri ĉio, kio baziĝas sur nura ekkono. Male liaj sentencoj estas kvazaŭ fulmoj, kiuj enlumas per mallonga blindiga lumo en la abismojn de la renkonto de homo kun Dio aŭ en la malrilaton inter esti kaj konsciiĝi, sen demandi, sen mediti kaj pripensi, sen fari iun logikan prijuĝadon.

La antagonismo de esti kunfandiĝas kun la senfina nescio ("ignorantia mystica") kaj estas senemocie tolerata:

Mi ne scias, kio mi estas; mi ne estas, kion mi scias: aĵo kaj ne aĵo; punkteto kaj cirklo.

Kontraŭe al la "Philosophia mystica" de Jakob Böhme aŭ de Daniel Czepko "la Keruba Migranto" do ne reprezentas per si mem iun filozofian idearon, sed ĉiu duversaĵo reprezentas per si mem unu personon, unu animstaton, renkonton kun Dio, ekestis senpere kaj tuj kaj havas neniun koneksojn aŭ rilaton al aliaj.

Tamen estas interligilo inter ĉiuj mistikaj sentencoj kaj perceptoj, nome la severa, antiteze-spiritplena kaj treege akriĝita formo de la epigramaj Aleksandro-paroj. Tiuj estas tamen pli libere konstruitaj ol en Esperanto. Dum en Esperanto (kp. Kalocsay/Waringhien/Bernard: Parnasa gvidlibro 1984, p. 50) la versoj ĉiam estas egale konstruataj kun cezuro post la sepa silabo, en la "Keruba Migranto" alternas paroj da 12 silaboj kun vira rimo kun paroj da 13 silaboj kun ina rimo; krome la cezuro plej ofte estas post la sesa silabo, sed ankaŭ post la kvara aŭ sepa aŭ eĉ post la deka.

Laŭ la enhavo ili estas duonigitaj. Plej ofte en la unua linio estas farata objektiva konstato aŭ postulo, kiu estas daŭrigata, pliampleksigata, kompletigata aŭ kies sekvo estas montrata en la unua duono de la dua linio. Nur en la dua duono de la dua linio aperas la pinto: surpriza konkludo, neatendita rezulto aŭ la sumo de la mesaĝo.

Memkompreneble traduko de poezio ne eblas; ĉar nur en la origina lingvo

harmonias formo kaj enhavo. Tradukaĵo estas ĉiam nur helpilo, povas peri nur antaŭsenton. Tamen mi provos montrion ĵus dirita per unu ekzemplo. Estas unu el la plej konataj epigramoj, kiu tekstas jene, unue en la germana:

*Wird Christus tausendmal in Bethlehem geboren*

*Und nicht in dir, du bleibst doch ewiglich verloren.*

Kaj en Esperanto:

*Se Krist' milfoje estas jam sur ter' naskita*

*Kaj ne en vi, vi restas ĉiam mem perdita.*

Ni havas 13 silabojn kun ina rimo: “geboren/verloren” respektive “naskita/perdita”. En la kondiĉa propozicio estas supozita okazintaĵo: la milfoja naskiĝo de Kristo, kiu estas transigata sur individua kazo: la ne-okazinta naskiĝo de Kristo en vi. Tiam sekvas la neatendita rezulto: Por vi la saviga faro de Kristo restas senutila.

Du pliaj rimparoj entenas la saman penson, kiuj tekstas en proza traduko jene:

La kruco de Golgota ne povas savi vin, se ĝi ne estas starigita ankaŭ en vi.

Kaj:

Mi asertas, ke ne helpas al vi la resurekto de Kristo, se vi mem restas katenita per pekoj kaj angoro.

Angelus Silesius volas diri: Saviĝo ne okazas aŭtomate. Dio respektas la libervolon de la homo; li devigas nenium, male ĉiu devas fari la unuan paŝon al Dio, sian propran kontribuaĵon, por ke la graco, la saviĝo efektiviĝu.

Mi antaŭe diris, ke Angelus Silesius skribis siajn epigramojn tiel, kiel ili

venis en lian kapon. Tamen eblas atribui ilin al certaj temoj, ĉirkaŭ kiuj liaj pensoj ĉiam cirkulas, nome.

- La homo kaj lia esenco kaj celo
- La rilato inter Dio kaj homo en ilia diverseco (alieco) kaj identeco (unio). La unio kun Dio estas la celo de la homa koro kaj donas al ĝi kvieton kaj kontentiĝon.
- La amo al Dio kaj al la proksimulo
- Lia ideo pri Kristo
- Morto kaj eterneco

Ne eblas fari el la abundo de liaj epigramoj pli malpli kompletan super-rigardon: tial mi limiĝas elekti kelkajn ekzemplojn, kiuj montras la riĉecon de lia idearo. Kelkajn mi provas komenti, la plejmulton mi nur citos:

1) Homo, iĝu esenca; ĉar se la tempo forpasas, la hazardo same ĉesas, la esenco tamen restas.

Tiuj versoj entenas unue postulon, kiu ŝajne ricevas sian motivigon per la sekvantaj duon-versoj. Sed la senco de la postulo estas pli profunda, kion montras la fino: Nur nia esenca kerno, nia animo, daŭre restas, ne niaj ĉiutagaj zorgoj kaj necesoj, niaj hazardaj eksterajoj. Cetere: Ĉi tiu rimparo montras solvoprovon, kiun faras la baroka mistikulo, por eliri el la konflikto inter timo antaŭ la mondo kaj vivoĝojo: La homo fariĝas esenca, se li ne estas regata de ĉi tiuj hazardaj okazaĵoj, sed se li retiriĝas kaj direktas sian atenton al Dio kaj eterneco.

2) Mi scias, ke sen mi Dio ne povas vivi unu sekundon; se mi mortas, Li ne povas ne ellasi for la spiriton.

Ĉi tiuj versoj estas aŭdaca paradokso, ja ŝajne blasfemio. Kaj tamen ĝi prokla-

mas profundan veron: Vera amo unue serĉas ne la propran kontentiĝon, sed volas bonfari la amaton. Se do Dio vere estas la amo, Li mem serĉas la homon kaj volas beatigi lin. Se tio ne eblas al Li, mankas al Li, en homa maniero dirite, la vivobazo.

3) Homo, servante al Dio pro bono, pro beateco, pro gajno vi ankoraŭ ne servas pro amo kiel filo.

Laŭ Angelus Silesius nia vivovojo kondukas nur al Dio, se ni superas egoismon, la ĉefan obstaklon sur la vojo al devoteco kaj savo. Necesas servi al Dio, sen atendi iun profiton kiel infano pro pura amo.

4) La plej granda miraklo estas do sole la homo: Li povas esti, depende de tio, kion li faras, Dio aŭ Diablo.

5) Homo, se vi donas al Dio vian koron, Li redonas al vi Sian: Ho, kiom valora interŝanĝo, vi supren iras, Li malsupren.

6) La rozo, kiun vidas ĉi tie via ekstera okulo, same floris eterne en Dio.

Ĉi tiuj versoj apartenas al la plej profundaj el la kristana poezio. La sentempan belecon de floranta rozo povas ekkoni nur tiu, kiu scias sin liberigi el la dependeco de tempo kaj spaco kaj vidi malantaŭ la ekstera aspekto la esencon. (Parenteze dirite: La enhavo estas platona: La fenomenoj estas nur respegulaĵoj de la Diaj ideoj.)

Pliaj epigramoj, kiuj montras la preskaŭ ne-elĉerpeblan riĉecon de liaj pensoj:

7) Homo, kion vi amas, en tion vi estos transformata: Vi iĝos Dio, se vi amas Dion, kaj tero, se vi amas teron.

8) Plej grava Diservo estas kon-

formiĝi al Dio: Konforma al Kristo laŭ amo, vivo kaj agoj.

9) Dio estas en mi la fajro, kaj mi en ĝi la brilo: Ĉu ni ne harmonias unu kun la alia plej intime?

10) Dio devas esti la komenco, la mezo kaj la fino, se devas plaĉi al Li la faroj de viaj manoj.

11) Homo, vi deziregas de Dio la tutan ĉielon; sed se oni petas de vi pecon da pano, vi paliĝas kaj senkoloriĝas.

Homo, estante saĝa kaj ne samtempe amante Dion, al vi laŭ mi eĉ stultulo estas preferenda.

Kiu vidas en la proksimulo nenion alian ol Dion kaj Kriston, tiu vidas per tiu lumo, kiu eliras el Dio.

La rozo estas sen kial; ĝi floras, ĉar ĝi floras; ĝi ne atentis pri si mem nek demandas, ĉu oni vidas ĝin.

La kreaĵo estas libro; kiu povas legi ĝin prudente, al tiu tre evidente manifestiĝas ties kreinto.

Kristano, se vi povas infaniĝi el tuta koro, tiam la ĉielo apartenas al vi jam ĉi tie sur tero.

17) La animo estas kristalo, Dio estas ĝia lumo. La korpo, en kiu vi vivas, estas ties konservujo.

18) Haltu, kien vi rapidas? La ĉielo estas en vi. Serĉante Dion alie, vi maltrifas Lin ree kaj ree.

19) Ju pli vi ekkonas Dion, des pli vi konfesos, ke des malpli vi povas diri, kio estas Li.

20) Dio min amas solan: Li deziras tiom, ke Li mortas pro timo, se mi ne amas Lin.

Du okulojn havas la animo: unu rigardas al la tempo, la alia direktas sian atenton al la eterneco.

## La termino “mistiko”

La vorto “Mistiko” devenas de la greka vorto “μυστικόν”, kiu signifas „fermi la okulojn aŭ lipojn“ kaj en pli larĝa senco: “tute retiriĝi el la ekstera mondo kaj koncentriĝi sur la propra interno”.

Mistiko estas vojo al ekkono de specifa maniero. Mistikulo ne volas ekkoni la fundamentajn kaŭzojn de la ekzistado per abstrakta, teoria pensado, sed per profunda meditado. Tia klopodo troviĝas en ĉiuj kulturoj kaj pli altaj religioj kiel ekzemple en Hindio kaj en Neoplatonismo.

Reprezentantoj de la kristana mistiko dum la mezepoko estas ĉefe Bernard de Clairvaux (1091 – 1153), Hugo de Sankta Viktoro (1096 – 1141) kaj precipe majstro Eckehart (1260 – 1327). Profundiĝante en si mem ili volas renkonti Dion kiel la ĉefan kaŭzon de ĉiu estado, kiel la lastan realecon per mistika rigardo. Sed la kondiĉo por tio estas, ke oni forigas ĉiujn obstaklojn kaj malligiĝas el ĉiuj ligiloj, al kiuj la koro estas sindona kaj al kiuj ĝi povas forperdiĝi, ke oni rezignas pri ĉiu sopiro kaj deziro same kiel pri ĉiu scio kaj serĉo. Nur se la animo forĵetis de si ĉiun egoismon kaj iĝis kvazaŭ nenio, Dio povas naskiĝi, kiel diras majstro Eckehart. Ne sufiĉas, ke Kristo naskiĝis kaj mortis: ni mem devas fari nian parton, por ke la saviga ago efektiviĝu.

## Lia literatura verkaro

Angelus Silesius estas unu el la gravaj reprezentantoj de la tiel nomata “Silezia Jarcento” en la germana literaturo krom Martin Opitz, Jakob Böhme, Andreas Gryphius, Christian Günther, Christian

Hofmann von Hofmannswaldau, Caspar von Lohenstein, Friedrich Logau kaj aliaj.

1) Heilige Seelenlust (Sankta Plezuro de l’Animo) 1657, pliigita eldono 1668: spiritaj kaj religiaj kantoj en la tradicio de la baroka paŝtista poezio, el kiuj kelkaj ankoraŭ hodiaŭ estas kantataj kaj de katolikoj kaj protestantoj, ekz. “Mi volas ami vin, mia forto”, “Post mi! parolas Krist’ Jesu”, “Nigran nokton luna stel”.

Influo sur la evangelia pietismo kaj precipe sur Gerhard Tersteegen.

2) “Cherubinischer Wandersmann” (Keruba Migranto), 1657 kaj pliigita reeldono 1675; lia plej valora verko de spiritplenaj sentencoj kaj rimoj, en kiu la baroka mistiko atingis sian kulminon. Inspirita de Abraham von Franckenberg kaj ofta akordo kun la idearo de majstro Eckehart.

Kromaj notoj:

Scheffler:

“Post mi! parolas Krist’ Jesu” (Adoru n-ro 269).

“Nigran nokton luna stel” (Adoru n-ro 399).

Tersteegen:

“La forton mi de l’amo benas” (Adoru n-ro 439).

“Ni gloras Vin, ho riĉa font” (Adoru n-ro 368).

“Jen tag’ al tago diras” (Adoru n-ro 663).

“Dio ĉe ni estas” (Adoru n-ro 846).

# Longa vivo

Julia Sigmond, IT/RO

**L**a plej grava problemo de la longviva homo estas: kiun taskon li ne plenumis, ke ankoraŭ li devu vivi, ĉu? Kaj li vicigas la jam faritajn aŭ finitajn, por plifortigi sian memfidon kaj mildigi la konscienciproĉon, ĉar la longviva homo bone scias, ĉiam estas pli da farindaĵoj, ol kiom li sukcesis plenumi.

Mi tre dankas, Doloro, (preskaŭ mi skribis: “Kara Doloro”!), ke foje ci vekas min nokte kaj ne lasas min dormi, ke mi memoru kaj pensadu: kiun taskon mi devas ankoraŭ plenumi?

La radoj de la kapo jam akcelas sian movon, sed ankoraŭ ili turniĝadas (murmuradas?), grincadas (knaradas?), klakbruas (stertoras?).

Post iom da tempo la longviva homo ekmemoras pri multaj ankoraŭ ne plenumitaj taskoj kaj jen prezentiĝas la dua plej granda problemo.

Bone-bone, sed de kie ĉerpi la necesan forton kaj energion por plenumi tiujn taskojn? Ja delonge evidentiĝis la pravo de la konata sentenco: “La animo pretas, sed la korpo feblas!”

Tiel ekas la granda batalo.

Ĉi tiun taskon mi nepre devas plenumi. Hodiaŭ. Nun. Ne eblas prokrasti.

Sur ĉi tiu batalkampo ne troviĝas heroaj mortintoj, nek mortvunditoj. Ĉi tie troviĝas nur venkintoj. Ne necesas tombaj florkronoj, sufiĉas unu sola floreto.

Post la tasko plenumado alvenas – la vere meritita – horizontala ripozo, la agrabla, ridetanta kontento, la feliĉiga sento: mi sukcesis!

Eĉ la Doloro mildiĝas. Ja ankaŭ hodiaŭ ĝi sukcesis plenumi taskon! Nun ankaŭ ĝi kolektas la fortojn. Morgaŭ ĉio komenciĝos denove.

La longviva homo enpeniĝas: kiom da morgaŭoj li havos, ĉu? Kaj ĉu li povos plenumi ĉiujn prokrastitajn taskojn?





# Pri miaj Esperanto-tekstoj

Gerrit Berveling, NL

**S**e diri ĝenerale: la vido estas grave difektita, sed mi iom kutimiĝas kaj pli bone povas eluzi ĝin. Aldona problemo, kiu intervenas, estas, ke ambaŭ Madzy, la edzino, kaj mi estis malsanaj – pro la ĉi-jara gripo, kiu montriĝas nekonate obstina – ŝi krome ekhavis pulm-inflamon, kio devigis ŝin al pli ol kutima endomeco. Kelkfoje tamen, piedirante kaj daŭre ĉirkaŭrigardante tre emfaze por maltrafi nenion, mi foje sola butikumis. Ĉio en ordo.


Koncerne sekvaĵojn de mia infarkto, mi konstatas, ke mi pli kaj pli bone kapablas legi ne tro komplikajn tekstojn – ankaŭ librojn, plurlingve kiel antaŭe. Eble vi scias, ke mi estis tradukanta – jam jardekojn – dikan libron el la Greka. Dum la infarkto tio estis interrompita – mi timis: definitive ĉesigita, sed montriĝis je mia granda ĝojo, ke kvankam tre necertece kaj ege stumble, iom post iom montriĝis, ke mi kapablas plu traduki. Do kvankam multe malpli rapide, mi daŭrigas en tiu memelektita tasko.

Retrorigardante mian Esperantistan vivon, kun certa troigo mi povas diri, ke mi elektis tre nekutiman Greklingvan tekstaron el frua kristanismo, komencis traduki ĝin tutece – nur flankepasante kelkajn seninteresajojn tro infanecajn aŭ nurajn frukristanajn Latinigaĵojn – kun la intenco, ke finfine aperu tiu frukristana tekstaro APOSTOLAJ PATROJ komplete en Esperanto, sed mia entre-

preno jen kaj jen estis interrompita de plej diversaj aferoj.

Plej unue aperis ĉe IABO (INTERNACIA ASOCIO DE BIBLIISTOJ KAJ ORIENTALISTOJ) en Ravenna (Italujo) en 1979 mia unua tradukaĵo el tiu tekstaro: LA DIDAĤEO.

Jam plurajn jarojn antaŭ tio mi estis tradukanta unu el la plej komplikaj libroj, kiujn tiutempe mi konis en la Latina: APOLOGIO (APOLOGETICUM) de Tertuliano. Por provi iel konatiĝi laŭnome, mi vaste dissendis ekzemplerojn de mia LA EVANGELIO LAŬ PETRO & LA MORTO DE JESUO KAJ KIO POSTE? – serio Voĉoj Kristanaj n-ro 1, Vlaardingens NL, 1980. Al mia unua versio de tiu APOLOGIO de Tertuliano venis sufiĉe da valoraj reagoj, pliĝustigo-proponoj ktp – precipe honoro-



kiale mi menciu la tre detalajn rimarkojn kaj proponojn de Gaston Waringhien kaj de Albert Goodheir. De Jean Thierry, male, mi ekhavis la averton, ke prefere mi serĉu propagandan taskon nialande pri Esperanto, sed ke tradukadon nepre mi ĉesigu: mi nur kondukus la homojn al problemoj – uzante tro komplikajn tekstojn.

Mian Tertuliano-tradukon duafoje mi komplete tralaboris, kaj en 1982, ĉar neniu eldonisto pretis aperigi ĝin, mem presigis ĝin en la lernejo kie instruiste mi laboris. El la origina kvanto restas ankoraŭ kelkdek ekzempleroj.

Do “eldonisto” mi fariĝis – kun marko “VoKo” – “VOĈOJ KRISTANAJ”. Ĉe IABO poste aperis en 1981 ankaŭ traduko mia de EVANGELIO KOPTA LAŬ TOMASO.


Apud mia plentempa laboro kiel instruisto en Vlaardingen (klasikaj lingvoj kaj ĝenerala historio) en 1977 universitate mi ekstudis teologion kun la celo fariĝi pastoro. Samepoke ankaŭ mia edzino studis universitate – estis streĉa periodo.

En 1988 okaze de la Roterdama UK aperis mia dua granda traduko el la Latina: LAŬDO DE L' STULTECO de Erasmo. Erasmo uzas tiel brilan stilon, ke nur kelkaj monatoj estis necesaj apud mia profesia laboro. Dum tiu UK mi ricevis viziton de Prof. Evaldo Pauli el Brazilo, kiu proponis al mi, nome de Gersi Alfredo Bays de eldonejo FONTO, ke tie aperu pli bele miaj TRI 'STAS TRO kaj LUKIO AŬ AZENO de Lukiano. Tiun proponon volonte mi akceptis: jen komenciĝo de mia multjara kunlaboro kun BAYS/FONTO.

Ankaŭ aliterene mi ekaktivis en Esperanto: mia unua Esperanto-instruisto Jan van Keulen estis redaktoro de DIA REGNO kaj tiu fakto disponigis al mi facilan aliron por prezenti al la publiko plurajn eseetojn kaj tradukaĵojn el temoj kristanaj, precipe fru-ekleziaj.

Baldaŭ venis peto de Gersi Bays, kiu konstatis, ke mi estas fakulo pri klasikaj lingvoj kaj teologo, ke mi verku novan tradukon pri la Nova Testamento, ĉar la ĝistiam Esperanto-traduko al li ne estas kontentiga – ja el ne tute fidinda: el versio renesancepoka. Mi komencis per traduko de unu evangelio – Laŭ Marko – kaj montriĝis, ke ĝuste por pastora laboro tiu kombino estas mirinda. Do mi daŭrigis. Bays aperigis la kvar evangeliojn en ĉarmaj libretoj. Kaj mia projekto pri la APOSTOLAJ PATROJ provizore foriris el la atento.

De tempo al tempo krome mi aperigis aliajn tradukaĵojn – foje eĉ originale verkitaĵojn. Fine mia traduko de la NOVA TESTAMENTO estis preta – do ja kompreneble necesas traduko de la




verkoj bibliaj ankoraŭ mankantaj: mi tradukis kaj aperigis en 2001 du volumojn LA DUAKANONAJ LIBROJ. Fakulo pri Bibliotradukado venis kontroli ĝin kaj donis permeson oficiale aperigi mian tradukon. Poste, en 2006, KAVA-PECH eldonis la Bibliion en belege zorgita volumo kun tri eroj kune, la Malnova Testamento en traduko de L.L. Zamenhof, la Duakanonaj Libroj en mia traduko kaj la Nova Testamento tradukita de Brita Komitato. En 2008 tamen mi tion certasence kompletigis: volumo tria kun Duakanonaj Libroj, kiun rekonas nur la Greka kaj Rusa Eklezioj. Do mi reiris al la ceteraj eroj

de la frukristana tekstaro.

Intertempe ie tie aperis tradukoj miaj ankaŭ iel interesaj, sed kiuj nesisteme rilatas al la tuto – plej amplekse ekzemple la 5 aperintaj volumoj ANTOLOGIO LATINA. Do depost kelkaj jaroj mi ree enfokusigas la atenton al la origine entreprenita tradukado. Kelkfoje, ekz. en DIA REGNO ie tie jam aperis etaj ekzemploj el tio. Ĉe mia infarkto preskaŭ la tuto de APOSTOLAJ PATROJ estis preta – mi nun klopodas finfine kompletigi la tuton. Amiko BAYS/FONTO intencas aperigi la tuton en 5 volumoj.

☞



## Invito al Esperanto-muzeo en Svitavy

Petro Chrdle, CZ

[chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

**N**e estas multaj muzeoj de Esperanto en la mondo. La plej konata estas sendube tiu en Vieno kun longa tradicio. Inter tiuj, kies tradicio estas mallonga, kiuj tamen jam havas malantaŭ si multe da poresperanta kaj ankaŭ peresperanta agado, estas tiu en Svitavy (Ĉeĥio), lokita en romantika Ottendorfer-Domo, unu el la plej imponaj historiaj domoj en la urbo. Kaj tiun mi ĉi tie volas al vi prezenti, kaj al ĝi vin inviti.

La muzeo estis fondita en la jaro 2008 kaj krom ekspoziciejo por vizitantoj (en ĝi estas 13 surmuraj informpaneloj, 5 tablovitriroj, vico de vitroŝrankoj, plurmedia informpanelo kun tuŝkrano kaj



laborloko kun komputilo por esploristoj, enhavanta i.a. grandan Esperantan-ĉeĥan vortaron) ĝi posedas ankaŭ du depon-ejojn, en kiuj krom historie interesaj objektoj ligitaj al Esperanto estas lokita ankaŭ la riĉa biblioteko de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Menciindas, ke la unuopaj eksponaĵoj estas provizitaj per QR-kodoj por eblo ekscii pri ili pli.

La ekspoziciejo enhavas daŭran ekspozicion pri la ekesto kaj historio de Esperanto (lingvo kaj movado), krome pli ol la duono de la spaco estas ĉiujare ŝanĝata, por povi sinsekve prezenti diversajn aspektojn de la Esperanto komunumo kaj ĝia rilato al diversaj flankoj de homa agado. Kiel ekzemplon mi povas menci la ekspozicion “Spiritaj tradicioj de la mondo kaj Esperanto” en la jaro 2011/12, kie estis relative detale prezentitaj ankaŭ agadoj de kristanoj (kaj KELI, kaj IKUE).

La nuna dumjara ekspozicio estas titolita “La homo kontraŭ Babelo”. Ĝi prezentas la plej ĉefajn personojn en la Esperanto-movado, kiuj havis en la jaro 2017 gravan jubileon: la iniciatinto de

Esperanto L. L. Zamenhof, la aŭtoro de la unua ĉeĥa lernolibro de Esperanto (aperinta jam en la jaro 1890) Francisko Valdomiro Lorenz, kiu kiel junulo translokiĝis al Brazilo kaj tie fariĝis grava kaj konata lingvisto. La tria, Teodoro Ĉejka, estas malpli internacie konata, tamen li havas multajn meritojn pri la evoluo de la Esperanto-movado enlanda kiel aŭtoro kaj eldoninto de Esperanto-lernolibroj kaj vortaroj kaj redaktoro de la unuaj Esperanto-gazetoj, aperintaj en ĉeĥaj landoj.

La muzeo en la Ottendorfer-Domo estas loko, kie oni povas admiri tri-dimensiajn esperantaĵojn, sed ne nur. Kaj en la plurmedia informpanelo, kaj en la poresplorista komputilo troviĝas virtualaj kolektoj, inter alie ĉiuj antaŭaj fizikaj ekspozicioj. Sed granda parto de la muzea agado, ĉefe danke al Pavla Dvořáková, estas en la virtuala mondo. Interretajn prezentojn oni povas trovi en tri diversaj lokoj:

1. Muzea retejo *muzeum.esperanto.cz* en pluraj lingvoj, plej vaste komprenebla en la ĉeĥa kaj en Esperanto.
2. Paĝo ĉe *Ipernity*, kiu funkcias ekde la jaro 2011. La nombro de la vizitantoj el ĉiuj mondopartoj ĉiujare kreskas, ĝi estas nun dekoj da miloj jare. Por trovi ĝin sufiĉas enmeti en serĉilon “ipernity muzeo”.
3. Ĉe *Facebook* ekzistas riĉaj paĝoj kaj de la Esperanto-muzeo en Svitavy, kaj de la tiea Esperanto-klubo. Krome ĉe Facebook viglas grupo “Amikoj de Muzeo de Esperanto Svitavy”, kiu havas 396 diskutantajn membrojn.

La muzeo ankaŭ zorge traktas la



hereditajn atestojn pri la Esperanto-aktiveco de niaj antaŭuloj, kelkfoje jam malbone legeblajn. Precipe danke al Miroslav Malovec (kun kolektivo de kunlaborantoj) ĉiuj kun almenaŭ ioma historia valoro estas skanitaj kaj storitaj en granda ekstera memorilo en la muzeo.

En Svitavy jam antaŭ la fondo de la Esperanto-muzeo agis laŭnombro ne granda, tamen vigla Klubo de amikoj de Esperanto, do diversaj Esperanto-aranĝoj tie jam havis sian tradicion. Post la ekfunkciigo de Esperanto-muzeo la agado ĉirkaŭ ĝi ankoraŭ plivigliĝis, precipe se temas pri internaciaj aranĝoj. Oni certe rememoras la KELI-kongreson en la jaro 2013, sed da similaj aranĝoj estas ĉiujare kelkaj. Mi nomu almenaŭ Ekoturisman renkontiĝon por biciklantoj kaj piedirantoj, oficialan antaŭkongreson antaŭ la UK en Nitra, OSIEK-konferencon, vikipedian seminarion, ...

Tiuj Esperanto-renkontiĝoj estas allogaj por eksterlandanoj ne nur pro la eblo konatiĝi kun la Esperanto-muzeo kaj ĉar la lokaj esperantistoj kapablas krei perfektan Esperanto-etoson, sed ankaŭ la urbo mem kaj ĝia ĉirkaŭaĵo havas multon interesan por proponi. En la Urba Muzeo estas daŭra ekspozicio pri la vivo kaj agado de Oskar Schindler, naskita en Svitavy, kaj la savinto de multaj judoj, kaj en la urbo mem estas multaj vidindaĵoj kaj historiaj, kaj modernaj, sed nelaste, la urbo havas belan ĉirkaŭaĵon invitantan al agrablaj promenoj.

Kaj jen fine la invito lige al la Ekumena kongreso en Poděbrady:

La kongreso komenciĝas lunde la 6an de


aŭgusto. Estas do bona ŝanco veni en Ĉeĥion du tagojn pli frue kaj partopreni la unuan parton de la solenaĵo de la 85a datreveno de la loka Esperanto-klubo. La festo komenciĝas la 4an de aŭgusto kaj daŭras en Svitavy ĝis la lundo la 6a. Poste ĝi daŭrigos en Bartošovice, sed la partoprenantoj de la kongreso povas veturi anstataŭe al Poděbrady, kion ankaŭ mi faros. Kaj mi rekomendas survoje paŭzi en Litomyšl, ne nur pro tio, ke ĝi estas al esperantistoj bone konata de la romano de Karolo Pič “Litomišla tombejo”, sed ĉar ĝi estas pitoreska urbo kun fama kastelo registrita per Unesco kiel monda kultura heredaĵo. Mi volonte dumvoje ĉiĉeronos, kaj ankaŭ povas enaŭtigi unu aŭ du ĉeestantojn, kiuj venos per trajno. La partoprenkotizo por la Svitavy-parto estas nur 200 CZK (8 EUR), estas tie ankaŭ eblo de favorpreza, tamen relative komforta tranokto. Do mi povas tion varme rekomendi! Pliajn konkretajn informojn la interesigantoj povas ricevi de la ĉefino de la Muzea grupo Libuše Dvořáková, [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz), aŭ ĉe mi (la retadreso supre).

Mi komprenas, ke ne ĉiuj povas persone veni al Svitavy, sed mi petas ankaŭ tiujn, kiuj konatiĝos kun la muzeo en la reto, iel reagi. La eksterlandaj reagoj estas tre gravaj, por ke la urbaj instancoj vidu, ke per disponigo de spaco por la Esperanto-muzeo ne nur ili helpas al esperantistoj, sed ke pere de la muzeo, Esperanto helpas disvastigi informojn pri la urbo Svitavy en la mondo.



# Informetoj

Partoprenantoj en la Bibliaj Tagoj 2018, kiuj okazis en Mainz



## Aliĝintoj

al 22-a Ekumena Esperanto Kongreso 2018,  
Poděbrady, Ĉeĥio

Daŭrigo

62. Järnlström Agneta,	Svedio	67. Leuze Ernst,	Germanio
63. Landfors Anna,	Svedio	68. Platek Stanislao,	Pollando
64. Landfors Mats,	Svedio	69. Polnický Tomáš,	Ĉeĥio
65. Prudko Sergij,	Ukrainio	70. Noske Gottfried,	Germanio
66. Koss Christa,	Germanio	71. Moser Johano,	Germanio

# Pavel Polnický (10/4 1943), honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

## Pavel Polnický 75-jara

La 10-an de aprilo 2018 festos nia honora membro gravan vivjubileon. Iama asocia sekretario, poste aktiva de KELI, prizorganto de la gazeto Dia Regno kaj aranĝanto de pluraj KELI-kongresoj estis honorita ankaŭ de sia urbo.



La 2-an de marto 2018 en plenplena teatro estis festata **Tago de Poděbrady**, fama banurbo por kuracado de kormal-sanoj. Konferis Petr Vichnar kaj Leona Macháľková. Enkadre de la programo estis honorigitaj kelkaj civitanoj, inter ili ankaŭ esperantisto **Pavel Polnický**.



Město Poděbrady uděluje  
při příležitosti Dne Poděbrad

### Záslužný list

Pavlu Polnickému

za dlouhodobou aktivní práci  
v Mezinárodní esperantistické ligo  
při příležitosti životního jubilea

*Poděbrady*  
Město Poděbrady  
2018



V Poděbradách dne 2. března 2018

*Por la longtempa meritplena laboro en la Kristana Esperantista Ligo Internacia okaze de lia vivjubileo. Tiel tekstas la traduko de la honorigo.*

**P**avel lernis Esperanton en la vintro 1964/65 kaj tuj komencis aktive uzi ĝin. Jam en la jaro 1967 li partoprenis KELI-kongreson en Torre Pelice, Italio kaj en la jaro 1968 parte ankaŭ la 1-an Ekumenan Kristanan Esperanto Kongreson en Limburg, Germanio.

De tiu tempo li aktivas en nia ligo:

- 1973 – membro de estraro de ĉeĥa sekcio de KELI kaj poste diversaj funkcioj, nun longjare prezidanto
- 1990 – membro de internacia estraro de KELI
- 2005 – transprenis prizorgon de la presado de nia gazeto kaj ekspedo al abonantoj en 34 landoj
- 2007 – sekretario de KELI kaj de tiam estas oficiala adreso de nia ligo en Poděbrady

De la jaro 2000 li organizis jam 9 kongresojn de KELI, 5 okazis en Ĉeĥio (2011 en Poděbrady), 2 en Slovakio kaj 2 en Germanio. Ĉi-jare li preparas kongreson en Poděbrady denove.



*La KELI-estraro kaj la redaktoro multe gratulas Pavel P. kaj dankas pro lia multjara laboro, kiu espereble ankoraŭ longe daŭros.*

# Venu, benu, gloru

(originale verkita en Esperanto)



1. Ve - nu, be - nu, glo - ru!  
2. Kris - to, mi - a for - to,



Laŭ - du kaj a - do - ru!  
Li, la Di - a Vor - to,



Ve - nu, be - nu, glo - ru!  
Kris - to, mi - a for - to,



Di - o a - mas nin.  
Li a - ten - das min.



Li al ni en ĉi mi - zer' sur  
Mi kun Li el ĉi mal - hel' al



ter' el am' for - do - nis sin.  
Li, la cel', ek - mo - vu min.



Laŭ - du kaj a - do - ru!  
Li, la Di - a Vor - to,



Di - o a - mas nin.  
Li a - ten - das min.

VENU, BENU, GLOORU • M (kun motivo el la violon-  
konĉerto de Ludwig van Beethoven) kaj E (originale verkita):  
Albrecht Kronenberger 2018-01-15